Johannes R. Becher,

Nigraj veloj super la Bodeno

tradukita de Manfred Retzlaff

Foje iras veloj tra la land',
foje jen boatoj sur herbejoj.
Nigraj veloj sur monteto-rand',
kaj fluantaj estas la verdejoj.

Tra l' fragmit' en vent' lulanta sin
Estas ili kaŝe forglitintaj,
Staras jen la nigraj veloj pintaj
Meze sur la mar' en vent' je l' fin'.

Muelilo tie sin vidigas,
Kaj jen supreniĝas nigra vel',
La flugilojn ĝi jam surombrigas
Sonĝe antaŭ la vesper-ĉiel'.

Sin forŝovas kvazaŭ forblovite
Nun la lando kaj malfermas sin
En vesper-sunbril' la mar' medite.
Jen nigraj veloj ĉe la vido-fin'.

Traduko de la Germana poemo "Schwarze Segel überm Bodden" de Johannes R. Becher *(∗1891-05-22 – †1958-10-11) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2004-03-04.*

MR-423-1 / Arg-798-1601 (2013-01-30 22:11:10)

Bodeno, germana: Bodden, estas malprofunda akvejo disigita de la maro per insuloj aŭ terlangoj ĉe la bordo de la Balta Maro en Meklenburgio kaj Pomerujo. Pri la poeto vidu la retejon `http://de.wikipedia.org/wiki/Johannes_R._Becher`.